

Eŭropa himno

Kantu kune amikaro,
ni la ĝojon festas nur,
nek rivero nek montaro
plu landlimoj estas nun.

Ho Eŭropo, hejmo nia,
tro daŭradis la divid'.
Nun brilegu belo via,
ĉiu estas via id'.

Via flago kunfratigas
homojn post milita temp',
via leĝo nun kunigas
civitanojn en konsent'.

De l' Malnova Kontinento
ĝus ekstaris la popol';
gvidas ĝin tre nova sento
kaj kuniga forta vol'.

Sub la ŝildo de la juro
ni vivados en konkord'.
Tio estas nia ĵuro:
unu land' kaj unu sort'.

Jen ekzemplo por la mondo,
jen direkto, jen la voj':
Tuthomara granda rondo
en la paco, en la ĝoj'!

Aŭtoro de la teksto (2010 ?) : Umberto Broccatelli, Italio
lau la origina teksto de Friedrich Schiller „An die Freude“
<http://www.wix.com/dtislar/europo>

EU-Valoroj

Paco

Kion pli bonan ni povas deziri por nia estonto ol la evoluon kaj maturiĝadon en paco? Kaj harmonie kun tiu deziro ni ĝis nun sukcesis vivi! De 1945 ne estis grandaj militoj. Kompreneble, ni devas daurigi tiun procezon kaj samtempe helpi al malevoluintaj mondopartoj tiel ke al ĉiuj homoj ni certigu bazajn vivkondiĉojn. Nur tiamaniere ni kontraustaros militojn.

Respondeco

La rajtoj paralelas kun la respondecoj. Ni respondecas pri ni mem, pri nunaj kaj estontaj generacioj kaj pri la homaro. Kiam per scienco kaj ekonomia forto ni kreas novajn rimedojn por pli kvalita vivo, ni bezonas etikajn regulojn per kiuj ni juĝu ĉu la anĝoj bonas au damaĝas la nunan au estontan mondon? Ni devas agi respondece eĉ se tio kazas pli malrapidan evoluon kaj pli malgrandan profiton.

Sekulareco

La rajto libere elekti kredon kaj vivkonceptojn estas europa atingajho ekde la tempo kiam unuaj shtatoj akceptis decidon pri disigo de aferoj shtataj disde religiaj. La homo kiel »homo religiosus« devas kredi pri la senco de sia ekzisto kaj tial li estas ankau kredestajho. Sed ankau tiukampe li bezonas liberecon mem elekti ĉu kredi al valoroj, kiujn ofertas al li diversaj religioj au krei la propran rilaton al filozofiaj kaj etikaj demandoj.

Tutviva lernado kaj Scienco

La lernado estas fundamento de racia kaj ekvilibra vivo kaj agado. La avantaĝo de homo estas ke li povas tutvive lerni, ke li lernas pli rapide ol aliaj vivestajhoj kaj ke li povas transdoni siajn sciojn al la postaj generacioj. Moderna socio, ekonomia evoluo kaj alta teknologio postulas tutvivan kompletigadon de la scioj, subtenon por scienco kaj konsideron de ties atingoj.

Dauropova Evoluo

Se ni deziras certigi la estonton por la postaj generacioj, ne sufiĉas nur subteni la dauropovan evoluon sed nepras vivi lau ties principoj. La konsumismo ne rajtas resti valoro. Ni devas malpligrandigi uzon de energio, ni devas ripari interrompitajn naturajn ciklojn kaj forigi la malpurajhojn per kiuj ni sufokas la mondon. Tio ests ege grava por la tuta planedo kaj tio devus esti centra agadkampo en internacia politiko de Europo.

Egalaj Shancoj

La homoj defendas la proprajn grupojn kaj ni suspekteme traktras kaj malfacile akceptas aliulojn. Ni europanoj bezonas edukadon por europa konscio por ekhavi senton de aparteno al EU en kiu la civitanoj havas egalajn shancojn senkonsidere ilian sekson, rason, nacion, seksinklinon, lingvon, politikan pensmanieron ktp. Tie kie oni ne povas trovi komunajn celojn kaj viziojn la homoj devas lerni toleri kaj estimi alispeculojn.

Unueco en Diverseco

Ne estas vero ke diversaj religioj, popoloj, kulturoj, kutimoj kaj politikaj direktoj signifas per si mem riĉigon. Kiam renkontiĝas diversaj grupoj, okazas plej ofte kolizioj kaj bataloj, oni esprimas malferman malamon. Sed se ni havas komunan vizion, la diferencojn kaj europan buntecon ni komprenos kiel riĉeco.

Subsidiareco

Tio estas Europo kiu kontrauas centrismon. La ŝtaton interkonsente kreas regionoj kaj decidas sub kiuj kondiĉoj ili transdonos unuopajn decidrajtojn al komuna ŝtato. La ŝtatoj intertraktante decidas sub kiuj kondiĉoj ili transdonos parton de sia suvereneco al la komuna Europa Unio. Se same ankau aliloke en la mondo oni aplikus tiun ĉi principon certe en multaj landoj ne okazus detruaj bataloj kaj terurajhoj. Europo pro tiu principo estas modela ekzemplo.

Solidareco

Solidareco estas bazo por ĉiu socio. Kiam iuj havas problemojn, ni helpas ilin. Samtempe ni supozigas ke tiuj helpos nin, kiam estos bezonate. Pri solidareco necesas zorgi je ĉiuj niveloj: en la familio, inter najbaroj, inter urboj kaj regionoj, inter ŝtatoj kaj per internaciaj helpfondajhoj sed ankau se necesos rilate defendon.

Socialaj rajtoj

Ne nur ĉe la plej multaj malriĉaj landoj sed ankau ĉe la riĉaj ne estas memkomprenebla afero ke la socio devas prizorgi maljunulojn, infanojn, senlaborulojn, handikapitojn. Altan nivelon de socialaj rajtoj, aparte por homoj kun mapli grandaj ŝancoj akceptis lau la modelo de skandinaviaj landoj ĉiuj europaj ŝtatoj. Tiun nivelon ni devas gardi ankau en la estonto. Por esti ekzemplo alloga por aliaj mondopartoj ni devas konstrui laueble humanajn interrilatojn. Ni devas daure malgrandigadi socialajn kaj materiajn diferencojn.

Demokratio

Demokratio komenciĝis en antikva Grekio, sed ankau nuntempe ne ĉiuj ĝuas ties fruktojn. Europo devas haltigi ĉiun tendencon, kiu ebligus kreskon de totalismaj reĝimoj, kiel tiuj kiuj ĝin en la 20-a jarcento dufoje surgenuigis. Aliflanke ĝi klopodu ĉiam esti modelo por multaj landoj, kiuj tian nivelon de demokratiaj procezoj kiel Europo ankoraŭ ne havas.

Homaj Rajtoj

European konvencion de homaj rajtoj subskribis ĉiuj landoj kaj ni devas agi harmonie kun ili. La dokumento estas rezulto de plurjarcenta spirita maturiĝado, antau ĉio de Europo. Kvankam ŝajnas al ĉiu logike, ke ĉiuj homoj havas la rajton digne vivi, libere moviĝi kaj sin esprimi, ricevi bazajn sanservojn, posedi loĝejon, frekventi lernejon ktp, tamen tio ne estas memkompreneblajho. Tial necesas ĉiam ripeti konojn pri la homaj rajtoj kaj samtempe avertadi kiam ili ne estas aplikataj.

<http://www.wix.com/dtislar/europo>